

# ESPERANTO

## ★ TRIUMFANTA ★

N-ro 32, 15. Majo 1921

Jurnalo internacia, universala, sendependa  
eldonata de Teo Jung, Köln-Horrem (Germ.)

\* Eliras semajne. \*

### Opa Vendado de ET.

En sekvantaj lokoj ĜT nun estas aĉetebla ĉe stacioj, kioskoj, libroj aŭ alie:

#### Argentino.

Buenos Aires (s-ro Villafranca, B. de Irigoyen 1105).

#### Aŭstrio.

Wien (Kat. Esp. Unuiĝo, Kleeblattg. 7).  
Graz (librejo Kienreich, Sackg. 4).  
Knittelfeld (librejo Kneschaurek).

#### Brazilio.

Fortaleza-Ceara (s-ro Fr. Falcao, str. Major Falcundo 111).

#### Ĉeĥoslovakio.

Reichenberg (diversaj kioskoj).  
Saaz (librejo Kern kaj Neudörfer).  
Nusle (s-ro Čansky).

#### Danzig.

Libera Urbo Danzig (diversaj kioskoj).

#### Estonio.

Tallinn-Reval (kiosko).  
Haapsalu (s-ro Grünthal, Kalde t. 31).

#### Finnlando.

Helsinki (Rautatiekirjakauppa, stacio-asema).  
Tampere (Rautatiekirjakauppa, stacio-asema).  
Turku (Rautatiekirjakauppa, stacio-asema).  
Viipuri (Rautatiekirjakauppa, stacio-asema).

#### Francio.

Paris (kioskoj apud la stacio St. Lazare: Korto de Romo, 172, kaj 120, place de l'Harve, s-ino Mazille).

Béziers (kioskoj Lauriol kaj Pendariez).

#### Germanio.

Bamberg (stacia librejo Joh. Rasp).  
Braunschweig (Steinweg 1, gazetisto Schulze).  
Düsseldorf (Harkortstr. 21, gazetisto Leister).  
Essen (stacia librejo kaj kiosko Göb).  
Hannover (kioskoj Segler kaj Schulze).  
Koblenz (stacia librejo).  
Köln-Kalk (gaz. Püb, Postplatz).  
Mannheim (stacia librejo).  
Nürnberg (librejo Heerdegen-Barbeck, 1 minuto de la stacidomo).  
Plauen (supra stacio; gaz. Grundmann, angulo Bahnhof- kaj Fürstenstr.; gaz-ino Holzmüller, angulo Breite- kaj Bahnhofstr.).  
Stuttgart (diversaj kioskoj).

#### Hungario.

Budapest (s-ro Balkanyi; Hung. Esp. Soc. Lab.).  
Miskolc (Ljagsarterjesio; d-ro Nagy, Remenyi 4).

#### Hispanio.

Barcelona (Kiosko Barcelonés, Rambla).  
Bilbao (Escuelas de Berastegue).  
Gerona (gaz. Paulo Marull, kiosko frente Parque Bomberos, Rambla Alvarez).

#### Italio.

Milano (s-ro Busso, Via Fiamma 5).  
Rovereto (kiosko).

#### Litovio.

Kaunas-Kovno (stacia librejo kaj Draugija St. Kazimiro, D. Viln. g. 34).

#### Nederlando.

Rotterdam (s-ro Poolen, Zwaanshals 212).  
Hengelo (s-ro van Heek, Steynsir. 72).

#### Polio.

Warszawa (diversaj stacioj kaj kioskoj).  
Białystok (librejo Kagan, ul. Siemkiewicza 5).  
Bromberg-Bydgoszcz (diversaj kioskoj).  
Lodz (diversaj kioskoj).  
Siedlce (librejo s-ino J. Kapuscinska, Warszawska 36).

#### Rumanio.

Targul Mureş (Esp. Centro).  
Sibiu-Herrmannstadt (s-ro Gärtner, Rosenanger 6).

#### Ruslando.

Petrograd (kioskoj; la vendadon aranĝis s-ro Michel Ambros, Esli-Konsulejo).

#### Svisio.

Zürich (stacia librejo).  
Locarno (Liberata Giugni).

#### Niaj Abonejoj.

##### Aŭstrio.

Esp.-Societo por Stirio, Graz, Schönaugasse 6.

##### Bulgario.

Georgi Hr. Gaŝevski, Centra Librejo „Esperanto“, Bul. Marie Luiza 46, Sofia.

##### Ĉeĥoslovakio.

Otto Sklenčka, Hradec Kralové.  
Prof. J. Süsler, Saaz 687.

##### Estonio.

Helmi Drezen, sekretario de Est. Esp. Unuiĝo „Espero“, Riiüli t. 6, Tallinn.

##### Finnlando.

O/Y. Movado A/B., Kasarminkatu 20, Helsinki.

##### Germanio.

Postcheckkonto Köln 708 63, Teo Jung, Horrem Bez. Köln.

##### Hungario.

Paŭlo Balkanyi, Budapest, Hajos-utca 15, II, 2.

##### Litovio.

Paŭlo Medem, Kaunas, Smeliu g-ve 12.

##### Polio.

Adolfo Oberholman, Warszawa, Krak. Przedm. 10.

##### Portugaliao.

Agencia Esperantista, Silva & Carreira, 104, Apartado, Lisboa.

### PRAHA KAJ ĜIAJ VIDINDAĴOJ.

Oni scias, ke Praha estas pleneĝa je diversaj antikvaj memoraroj, historiaj kaj artaj monumentoj de ĉiuj epokoj kaj jarcentoj. Kelkaj kvartaloj, laŭ sia aspekto, prave povus esti nomataj „ŝtonĝita mezepoko“.

Ĉi tie ni citas nur la ĉefajn kaj plej interesajn vidindaĵojn, kiuj estas precipe vizitindaj ĉu pro antikveco, ĉu pro kuriozezo, ĉu pro arkitektura aŭ alia beleco. (La romaj ciferoj en parentezoj signifas la kvartalon de la urbo: I Malnova Urbo, II Nova Urbo, III Malgranda Urbo, IV Hradčany, V Josefov, VI Vyšehrad, VII Holešovice-Bubny, VIII Liben).

#### a) Arhivoj.

1. Urba arhivo (en la malnova urbdomo); 2. a. vicregnestra (III, str. Valštynska); 3. a. de landa muzeo (en la muzea domo, vidu t. ĉ.); 4. a. landa (ankaŭ en la muzea domo); 5. a. universitata (I, Karolinum); 6. a. de la kapitulo de S. Vito (IV); 7. a. de la kapitulo de Vyšehrad (VI); 8. a. agronomia (IV, Strahov).

#### b) Bibliotekoj.

1. Biblioteko de kruckavallira monaĥejo (I, placo Krizovnické 3); 2. b. de Muzeo de Naprstek (vidu t. ĉ.); 3. b. de Landa Muzeo (vidu t. ĉ.); 4. b. de monaĥejo de Strahov (vidu t. ĉ.); 5. b. universitata (I, pl. Mariánské, pli ol 300 000 volumoj).

### Abonoj al ET.

Ni liveras al ne-germanaj landoj:  
50 n-rojn por 80 germ. mk., 10 ŝil., 10 sv. fk., 20 fr. fk., 5 hol. guld., 2 dolaroj aŭ 25 liroj (lirojn ni akceptas nur el Italio); 25 n-rojn por duona prezo.

Al Germanio, Baltiko kaj Balkano 10 n-rojn por 10 gmk. — Al Polio 25 n-rojn por 150 mk., al Aŭstrio kaj Hungario 10 n-rojn por 30 kronoj, al Ĉeĥoslovakio 15 n-rojn por 20 kr.

Oni pagu per monbiletoj aŭ bankĉekoj. Germanoj pagu ĝis fino de junio al poŝtĉek-konto Köln 70865, Teo Jung, Horrem; post 1. julio ili abonu per la poŝto.

Negermanoj el bonvalutaj landoj ne pagu per poŝtaviŝoj, ĉar la poŝto donas parte nur 2/3 de la kurza valoro, kaŭzante al ni eviteblan perdon.

### La Nefideblulo.

#### Humeraĵo.

„Li ne estos vivanta!“ diris la akuŝistino, kiam ŝi helpis ĉe la naskiĝo. Eĉ ne ŝi batis lin por ke li rekonsciĝu el la svenado, eĉ tiom da peno la mizerulo ŝajne ne estis inda.

La nutristino kompantante ekrigardis lin: „Por kio mi turmentas min kun li, kiam li ne vivos longe!“

Kaj ŝi ne nutris lin sufiĉe. Malgraŭ tio la knabo ne mortis tuj, sed nur post sepdek jaroj.

Lia patrino ne donis ludilojn al li, kiel al siaj ceteraj infanoj:

„Domaĝe estus al li eĉ unuhelera lignoĉevalo, ĉar li ĝin certe rompus!“

Ci tiel ŝi diris! La knabeto do ludis nur kun la senpagaj araneoj, li donis al ili muŝojn, kaj neniam okazis, ke li estus disŝirinta eĉ unu araneoreteton. Sed eĉ la araneoj, kiuj de ĉiu ajn akceptis la muŝojn, ne fidis al li, suspektante rigardis lin kiel eble plej malproksime sur la retero kaj ek-kaptis la muŝojn nur tiam, kiam la donacinto jam estis forlirinta.

„Mi vere ne scias, ĉu estus inde sendi tiun ĉi idon en la lernejon?“ ekĝemis lia patro. „Mi vidas jam antaŭe, ke li neniam ellernos la A-B-C-on!“

La knabo tamen ellernis la literojn, kiel ĉiu ajn en la lernejo. Ci tiu merito — bedaŭrinde — restis por ĉiam sekreto; ĉar la instruisto, la bona, malsana maljunulo suspektis, ke ĉi tiu malfeliĉa knabo ne scias la lecionon kaj lasis lin neniam legi.

En la pilkoludo neniam lin akceptis iu partio. „Por ke ni perdu por vi la ludon? Vi povas atendi!“

Oni forpelis lin. La malfeliĉulo do ludis sola kaj batis iufoje la pilkon supren ĝis la kruco de la templo. Eĉ tiam li ne havis felikon; ĉar venis la sonorilisto kaj konfiskis la pilkon kaj la bafilon: „Ĉu vi volas malsupren ĵeti la krucon? Vi pogano!“

En la gimnazio li apartenis al tiuj lernantoj, kiujn la profesoroj timas kaj kiuj nur tiam respondas, kiam estas malfacilaj tagoj, pluvas, aŭ ili multe perdis en la kartoludo, ĉar ili jam antaŭe estis konvinkintaj, ke li nenion scias. Kaj kiam li tamen bone respondis, ili diris: „Ho, ĝuste hodiaŭ la leciono estis tre facil!“ kaj enskribis „sufficant“.

En la oka klaso la algebra profesoro foje klarigis malfacilan tezon kaj poste ion dubante sin turnis al la klaso:

„Ĉu estus iu inter vi, kiu ĝin deduktus sur la tabulo?“

Iĝis profunda frankvileco! Eĉ la unua eminenta estis ekfianta.

Nun ekstaris Gregoro.

„Kion vi volas?“ demandis la profesoro. „Nu, vi povas eliri, mi vin ne bezonas!“

„Mi ne volas eliri.“ respondis Gregoro, „sed volas dedukti la tezon.“

„Nu, se ankaŭ vi povas dedukti,“ ridis la profesoro, „tiam ni ĉesu, ĉar ne plue meritas la tempon por perdi.“

Ĉu vi volas esti soldato?“ ekiris ironie la soldatkuracisto antaŭ la rekrutvarbanta komitato. „Jes,“ respondis nia vireto.

Ridegante la kuracisto komencis mezuri la bruston, sed admiris, kiam li vidis, ke tiu mal-taksita brusto estas ses colojn pli larĝa, ol la reguloj deziras. Poste li pripalpis la brakojn, tibikarnojn kaj konvinkigis, ke ĉi tiu maldikegaĵo estas tute el ŝtalmuskoloj.

Iĝis milito, kaj nia Gregoro ekvidis en iu batalo, ke lian kapitanon la kontraŭuloj pistas. Li tuj kuregis tien, pikis, pafis, pistis, kaj savis la kapitanon.

„Oran medalon al tiu heroo!“ diris la kolonelo.

„Sed kiu li estas?“

La heroo estis ja nerekoncible pro la sango kaj fumo. Oni devis lin lavi. Kiam li jam estis lavita kaj oni rimarkis, ke li estas Gregoro, la tuta tendaro ekridegis:

„Ho, Gregoro! Nu, tiam ĝin estus ĉiu ajn farinta!“

„Kaj sur la bluzo de tiu ĉi vireto mankas tri butonoj —“ tondris la kolonelo. „Dudekkvin bastonojn sur lin!“

Kiam estis veninta la paco, Gregoro enamigis la filinojn de la pastro en Bálnaka.

„Ellnjo, mi amas vin —“ diris li iun lunan vesperon.

Elinjo ekridetis kontraŭen, kaj sinjoro la pastro sekvantan tagon ekparolis:

„Ekkomprenu min, mia pli juna frato! Vi kiel tute nefidebla ulo neniam, neniam ajn povus certigi kvietan porvivon al iu virino. Mi do petas, evitu li en estonteco mian domon.“

Gregoro havis unu riĉan onklonon. La mal-riĉa Gregoro — oni ne povas scii kial — tre amis ĉi tiun maljunan virinon kaj vizitis ŝin kelkfoje.

### c) Bildgalerioj.

1. Moderna galerio (VII, Kral. Obora = reĝa ĉasparko); 2. Domo de Aristoto (pli frue nomata „Rudolfinum“, I, kajo de Aleŝ; nun provizora parlamentejo; entenas kolekcion da gravuraĵoj de V. Holar); 3. Kelkaj privataj galerioj.

### d) Kasteloj kaj palacoj.

1. Reĝa kastelo (IV = meritis specialan arikonon); 2. palaco de Fürstenberg (III, Valŝtynska str.); 3. pal. de Lobkovic (III, pl. Vlaŝka str.); 4. pal. de Valdŝtyn (III, pl. Valdŝtynske); 5. pal. ĉefepiskopa (IV, pl. Hradčanske); 6. Kastelo de Liben (VIII).

### e) Monaĥejoj.

1. Monaĥejo de Aŭgustinidoj (III, str. Vlaŝka); 2. m. de Dominikanoj (I, str. Husova); 3. m. de Emaŭs (na Slovanech-II); 4. m. de Kapucenoj (IV, kun fama „Loreta“); 5. m. de Krukvalejroj (I, pl. Krizovnicke); 6. m. de Strahov (IV).

### f) Muzeoj.

1. Landa muzeo (II, pl. Vaclavske); 2. urba muzeo (II, parko de Porič); 3. etnografia m. ĉeĥoslovaka (kun agronomia muzeo — III, ĝardeno de Kinsky); 4. muzeo de Naprstek (I, str. Naprstkova); 5. arindustria m. (I, Sanyirova str.); 6. teknologia m. (II, str. Marianska); 7. teknika m. (IV, palaco de Schwarzenberg); 8. m. de Waldes (Vrŝovice — butonoj kaj agrafoj).

### g) Preĝejoj kaj kapeloj.

1. Preĝejo de S. Vito (IV, reĝa kastelo); 2. de S. Georgo (samloke); 3. de Karlo (II, str. „u Karlova“); 4. d. S. Nikolao (I, apud la Urbdomo, iam rusa, nun apartenas al ĉeĥ. eklezio); 5. de S. Nikolao (III, pl. Malostranske); 6. de Tyn (S. Mario — I, Malnovurba pl.); 7. de S. Stefano (II, str. Štepanka); 8. de S. Henriko (II, str. Jindriška); 9. de S. Triunuo (II, Spalena); 10. de S. Petro (pl. Petrske); 11. pr. en Karlin (antaŭurbo); kapeloj: 12. de S. Kruco (I, str. de Karolina Sveita); 13. de S. Longino (II, na Rybníku); 14. de S. Martino (VI); 15. de Betlehemo (kie predikadis Majstro Jan Hus — I, pl. Betlemske); sinagogoj: 16. s. de reform. hebrea eklezio (I, str. Dušni); 17. s. malnov-nova (V, str. Rabinska); 18. s. en Kral. Vinohrady (antaŭurbo).

### h) Teatroj.

1. Nacia teatro (II, Nacia avenuo); 2. atklasa t. (malnova germ. t. — I, Ovocny trh); 3. nova germ. t. (II, avenuo Sadova); 4. urba t. de Kral. Vinohrady.

### i) Urbaj Konstruaĵoj.

Komunuma (= Reprezentanta) Domo (kie estos malfermata la XIII-a Kongreso), kun apuda Pulva Turo; Malnovurba Urbdomo (kun la fama antikva horloĝo (I, Malnovurba placo); Novurba Urbdomo (pl. Karlovo); Ponto de Karolo IV-a kun interesaj pontaj turoj.

### k) Diversaj.

Observejo sur Petrin (dum hela vetero estas videblaj eĉ la limaj montoj); Klementinum (aro da konstruaĵoj, kelkaj preĝejoj, universitato, biblioteko, astronomia observejo ktp.); Karolinum (I, Ovocny trh); krom tio ceteraj interesaj pontoj, multaj monumentoj de diversaj eminentuloj, kelkaj lernejoj (plej belaj: en II, u sv. Vojtěcha, kaj en Karlin), ktp. VOČO.

## Kroniko.

**BUDAPEST.** La 3-an de majo Hungarlanda Esp. Societo aranĝis doman literaturan vesperon. Post la malferma parolado de Julio Baghy deklamis

„Mi scias bone, kial vi venas!“ ekkriis la onklino ĉiam. „Vi esploras, ĉu mi ankoraŭ vivas, ĉar vi atendas mian morton. Sed vane vi atendas, vi malbonegulo! Ĉar mian centmil-floran havaĵon mi emetis tute en la akciojn de la „Unua enlanda ĝenerala internacia horloĝo-streĉil-fabrikejo“ kaj testamentis ĉi tiujn akciojn al la hungara scienca akademio.“

Sed la „Unua enlanda ĝenerala internacia horloĝo-streĉil-fabrikejo“ fariĝis subite bankrota, kaj la mono de la onklino perdis ĝin la lasta helero. Gregoro tiam invitis la maljunulinon al si mem kaj sinjore, fidele ŝin vestadis ĝis ŝia en naŭdek-sep-jara aĝo alveninta morto. La onklino tamen neniam fidis al ŝia malbonega pli juna nevo, ŝi ekprovis la nutraĵojn ĉiam je la katoj ĉu tiu ĉi malbona homo ne volas ŝin veneni, kaj kiam ŝi jam agonias, ŝi diris, ke veneno ŝin portas en la tombon.

Kiam Gregoro estis 30-jara, li petskribis pro ofico. „Kian oficon vi volas?“ diris la oficestro malagrabla ridetante. „Mi scias jam antaŭe, ke vi ne estas enirona akurate en la oficon, ĉar vi estas ŝajne tre neakurata! Sed povas ja esti alie! Vi havos la oficon, sed nur por ke mi povu prui al vi kiel rapide vi ĝin perdos; ĉar vi — mi povas antaŭdiri — ne estos longe eniranta.“

Gregoro dum trideknaŭ jaroj ne preterlasis eĉ unu horon, nek venis unufoje malfrue. Sed en la kvardeka jaro iun tagon lia seĝo restis vakanta.

„Jen! Ĉu mi ne diris, ke ĉi tiu homo ne venos akurate?“ ekkriis la oficestro. „Mi ankau scias, ke li sin senkulpigis per iu malsaneco!“

Sed nia Gregoro ne sin senkulpigis, neniel, ĉar li estis mortinta.

Terinjo Tamas, Julio Hirschl, Elinjo Szekely, s-ino Tolnai, Elinjo Zsiross kaj la aranginto Julio Baghy. Mihaelo Sarossy (aktoro) kantis, fine Julio Baghy prezentis dramon monologon. — La vespero havis grandan sukceson, tiom pli, ĉar oni sukcesis atingi, ke dum la tuta vespero nur Esperanto estis parolata. La societo ripetos la literaturajn vesperojn pomonate.

**GENOVA (Ital.)** La 14. aprilo loka Lab. Esp. Grupo organizis multviziitan vesperan kunvenon por memori la kvaran datrevenon de la morto de nia Majstro. Elokvente paroladis s-ro Barni, prez. de la grupo, pri la vivo kaj meritoj de la granda Estfino. — S-ro Zunini gvidas kurson ĉe Reĝa Marmilita Akademio en Livorno. En Genova, s-anoj M. Arabeno (duagrada) kaj E. Managlia (unuagrada) gvidas kursojn. Publika propagando per muraj afiŝoj kaj disdonado de esp. verkoj al la urba kaj popola biblioteko. Pro tio la Laborista Esp. Grupo (Casella Postale 922, Genova, Italujo) petas tute ĝentile (donace) la sendon al ĝi de esperantaj por disdoni al la biblioteko, propagandante tiamaniere Esperanton.

**KLADNO (Ĉeĥoslovakio)**. Laŭ poŝtkarto ricevita el tiu ĉi loko sed preskaŭ ne legebla (la inko disviŝiĝis) en Kladno estas vigla esp. movado. Okazis paroladoj, funkcias grupoj, kaj la gazetaro estas favora. En libera popollernejo (senkonfesia) Esperanto estas instruata. Konversaciaj vesperoj okazas ĉiulunde.

**KOBLENZ (Germ.)** La 10. aprilo okazis ekskurso al Neuhäusel laŭ invito de s-anoj en Bad Ems. — Dum la tuta somero la kunvenoj estas ĉiumarde kaj -vendrede vespere en rest. „Union“, Löhrstr. — Oni antaŭlaboras por granda propagando-ago je l' fino de l' somero. — La ĵurnaloj estas favoraj. — ET estas aĉetebela en la ĉefstadoma librejo de s-ro Lothar Martini. — La 26. kaj 27. aprilo okazis ĉi tie Internacia Kongreso de la Kristanaj Kamlaboristaj Ligoj, kie s-ro Stroh, prez. de la esp. grupo, dufoje, bonaplaŭdite, rekomendis la uzadon de Esperanto.

## Jarkunveno de Sveda Esp. Federacio.

La nunjara jarkunveno de S. E. F. okazis dum la paskaj tagoj (25.—28. marto) en Falun. Reprezentantj estis la grupoj Stockholm, Gevle, Sandviken kaj Falun kaj kelkaj izolaj membroj.

Vendrede posttagmeze okazis la malferma kunveno, dum kiu s-ro Nylén donis resumon pri la tutmonda esp. movado. Vespere estis komuna mango parlopreparata de trideko da gesamideanoj.

Sabate antaŭtagmeze estis la unua laborkunveno kun lego de la jarraporto, diskutoj ktp. Posttagmeze vizito al la fama kuprominejo de Falun kaj al la provinca muzeo „Dala Fornsal“, poste daŭrigo de la laborkunveno; priiraktoj pri la federacia organo „La Espero“, pri la interrilato de la Federacio al la internaciaj organizaĵoj, rajtigo de delegito al la Praha kongreso ktp. Laŭ propono de la grupo Malmö oni decidis peti permeson de la fervojo kaj poŝta estraroj por elpendigi afiŝojn pri Esperanto kaj UEA en stacidomoj kaj poŝtoficjoj. Laŭ invio de la sama grupo oni elektis Malmö kiel urbon por la proksima jarkunveno.

Dimanĉe matene estis ekskurso al historia loko Ornäs, posttagmeze jarkunveno de Eldona Societo Esperantista kaj vespere publika parolado malmultnombro vizitata en gimnazio, poste komuna adiaĵa mango. Je la 11-a oni disigis post pena sed utila kaj agrabla kunestado.

(Laŭ „La Espero“.)

„Ho, kiel stranga estas tiu ĉi kadavro!“ murmuris vespere la kuracisto. „Ŝajnas, ke li ne estas tute mortinta.“

Poste li balancis, auskultis, frapis la kadavron kaj fine iris la gantojn supren:

„Provizore mi ne eldonas la permeson por enterigi, ĉar ĉi tiu homo estas al mi tro suspektinda.“

Kvaran tagon kredis ankaŭ sinjoro la kuracisto. Nun la energio iĝis tre urĝa. Venis la enterigistoj kaj metis Gregoron en la ĉerkon. La unua servisto alportis kvar najlon kaj surnajligis la ĉerkokovrilon. Poste ankaŭ la dua alportis du najlojn el sia poŝo kaj duone humore, duone superstiĉe diris al sia kompaniano:

„Tiu ĉi mortinto havas tiom strangan mienon! Ankaŭ mi ennajligas, por ke li ne povu noktmeze eble reveni.“

Kaj enbatis la najlojn.

La mizera Gregoro ja ne intencis, tute ne, reveni, nek noktmeze, nek alitempe.

Tradukis el hungara lingvo  
ZOLTÁN POLNÍK,  
Budapest, Marvány u. 29.

## Sporto.

### Piedpilkio.

Lastan dimanĉon estis la landa turniro inter Nederlando kaj Italio en la stadio de Amsterdam. La italoj ŝajnis superaj, tamen la rezultato restis neŭtra (2:2).

Piedpilkista bando Eniria-Giliardo, Milano, malvenkis en Mannheim kontraŭ V. f. v. per 0:3 kaj ludis en Karlsruhe 2:2 kontraŭ la tiea piedpilkista klubo.

## S-ano Josefino Finholdt †.

La morto forprenis el nia mezo f-inon J. Finholdt en Akersbakken, Kristiania, Norvegujo, en la aĝo de pli ol 63 jaroj. Ŝi estis ŝatata instruistino ĉe popollernejo en Kristiania kaj dum ĉ. 15 jaroj energia propagandistino por Esperanto en Norvegujo. Ankaŭ ŝi estis unu el la unuaj abonantoj al ET. Estu al ŝi la tero malpeza!

## Tra la Mondo.

La germana parlamento en sia kunsido de 10. majo rajtigis la registaron akcepti la ultimaton de la Entento de 5. majo.

La franca registaro permesis la eksperton de 10 000—15 000 tunoj da malgrandpeca karbo el nordfrancaj minejoj de Dunkerque, Calais kaj Boulogne al Anglio. La germanaj karboliveroj al Francio estis laŭ oficiala sciigo en februaro 705 359, en marto 583 850 tunojn.

La kronprince de Japanio alvenis en Londono kaj estis akceptata ĉe la stacidomo de la reĝo. Por honoro al la kronprince estis aranĝata festeno en Buckingham Palaco, ĉe kiu la reĝo de Anglio kaj la kronprince esprimis toaŝtojn akcentantajn la signifon de la daŭrigo de l' angla-japana alianco en la intereso de la mondopaco.

Senatano Giuseppe Greppi, eksambasadoro de Italio en Petrogrado, mortis 103-jara en Milano, la 8. majo.

Grandega brulo detruis en Lyon (Franc.) la oficejon por militistaj vestaĵoj kaj la intendantejon. La brulo supozeble daŭros ankoraŭ kelkajn tagojn.

## Internacia Esperanto-Servo.

(La traduko kaj la represo en naciaj ĵurnaloj kun aldono de la vortoj „Internacia Esperanto-Servo“ estas permesata.)

LETERO EL PALESTINIO.

Haifa, majo 1921.

La vizito de Lord Churchill en Jeruzalemo, festita per manifestoj de ĝojo kaj estimo de Herbert Samuel, de l' Emiro Abdallah, de judoj kaj de kelkaj araboj, kontentigis nek la judojn, kiuj estis severe admonitaj de li, nek la plimulton de araboj, enloĝantaro precipa de Palestino. Al la judoj Churchill deklaris, ke Balfour en nomo de la angla registaro promesis helpojn por fari Palestinon ne la patrujo aŭ helmo de judoj, sed nur patrujo. Ĉar ĝi devus esti kaj resti patrujo de araboj, ĉu mahometanaj, ĉu kristanaj. Li deklaris ankaŭ, ke la situacio de Anglio, la mandataria potenco, ne permesas elspezojn por la starigo de juda patrujo en Palestino, sed ke la judoj mem devas kolekti la sumojn bezonatajn. Komprenite tiu ĉi sciigo malmulte plaĉis; ĉar la mono sufiĉa mankas ankaŭ al la cionista societo. La sukceso de monkollektoj faritaj kaj farotaj en Usono restas duba.

Pli severaj estis la admonoj de Churchill al delegitoj arabaj. Se la partio araba lastatempe esperis helpojn de la budenoj transjordanaj, tia helpo nun malaperis; ĉar Transjordanio kiel nova ŝtato estas komisiita al Emiro Abdallah, kiu ricevis ankaŭ specialan donacon de barono Rothschild kaj promesis sindonan amikecon al registaro angla kaj franca. Kion li promesis en Jeruzalemo al Churchill kaj al la reprezentanto de Sirio, tion li ripetis solenmaniere en Amman okaze de la vizito de Herbert Samuel akompanata de siaj oficeroj alvenintaj parte sur tero, parte tra aero.

## La Revela Kongreso en la Gazetaro.

Pri la kongreso de Reinlanda-Vestfalia Esp. Ligo raportis multaj ĵurnaloj. Ni sciigis pri jenaj notoj, anoncantaj la okazontan kongreson:

Stadt-Anzeiger, The Cologne Post (du notoj), Rheinische Zeitung kaj Rheinische Volkswacht en Köln. Horremer Zeitung en Horrem. Neue Zeit en Düren. Volkszeitung en Godesberg. General-Anzeiger en Koblenz. Düsseldorf Nachrichten en Düsseldorf. Echo vom Niederrhein en Duisburg. Niederrheinische Volkszeitung en Krefeld. Niederrheinische Landeszeitung en Geldern. Allgemeine Zeitung en Essen. Berg und Mark en Elberfeld. Hagener Zeitung en Hagen. Anzeiger, Zeitung kaj Volkswille en Münster. Westfälischer Anzeiger en Hamm kaj Tremonia en Dortmund. Post la kongreso aperis raportoj en sekvantaj ĵurnaloj:

Kölnische Zeitung, Kölnische Volkszeitung, Kölner Tageblatt, Stadtanzeiger kaj Rheinische Volkswacht en Köln. Horremer Zeitung en Horrem. Aachener Anzeiger kaj Politisches Tageblatt en Aachen. Stolberger Zeitung en Stolberg. Volkszeitung en Godesberg. Koblenzer Zeitung, en Koblenz. Rheinisch-Westfälische Zeitung en Essen. Hagener Zeitung en Hagen. General-Anzeiger en Dortmund.

Precipe rimarkindaj estas la raportoj en la tre grava Kölnische Zeitung kaj en Rheinisch-Westfälische Zeitung, kiuj ĝis nun ignoregis nian movadon, ĉar ili rigardis Esperanton kiel kontraŭnacion. Ankaŭ la notoj en The Cologne Post, brita ĉiutaga ĵurnalo aperanta en Kolonjo, estas speciale menciindaj.

Sed neniu konfidis je paco kaj trankvileco de la nova Transjordanio sub la nomo de l' Emiro, sed fakte sub la administrado de oficio angla.

Grava demando por Palestino estas la formado de defend-armeoj de soldatoj libervolaj post la foriro de preskaŭ ĉiuj batalionoj anglaj. Ĉu estos eble formi regimentojn samtempe de mahometanoj, kristanoj kaj judoj? Ne estos danĝere formi regimentojn pure arabajn kaj pure judajn? Ĉar la malamo inter araboj kaj judoj daŭras kaj daŭros malgraŭ la nuna paco.

Demando malpli grava estas la elekto de speciala standardo kontentiganta ĉiun. Kiel araba Palestino reklamis la kreskanton aŭ lunfalĉilon, kiel kristana la krucon, kiel juda la sespintan stelon aŭ sildon Davidan. Tial aliaj proponas emblemon komunan kaj unuigitan, p. e. olivarbon aŭ alian karakteran arbon palestinian. Vivonto estos vidanta.

P. E. S.

## LETERO EL LITOVIO.

Kaunas, 26. aprilo.

La okuloj de la litova nacio nuntempe estas direktitaj al la orienta parto de Litovio, t. e. al la regiono de Vilnius (Wilna), kiu estas okupita per pola armeo de generalo Zeligovski.

Por solvi tiun dispuablan demandon pri Vilnius, estas kunvokita la 18-an de aprilo speciala konferenco en Bruxelles (Belgio), kie sub la prezido de s-ro Hymans de Ligo de Nacioj estas traktataj la interkonsiloj de pola kaj litova delegitaro. Kiamaniere tiu demando en la Bruxelles'a Konferenco estos solvata, pri tio ni ankoraŭ ne scias; sed la gvidantoj kaj estroj de la pola armeo de Zeligovski asertas, ke — kiel ajn estos solvata la demando pri Vilnius — la poloj neniam fordonas la urbon al la litovoj ĉe tiam, se Bruxelles'a Konferenco decidus transdoni Vilnius kaj ĝian regionon al Litovio.

Antaŭ kelkaj tagoj ĝis la konferenco en Bruxelles la registaro de Zeligovski en Vilnius malpermesis eldoni ĉiujn litovajn gazetojn. Ankaŭ oni komencis pli severe persekui la litovajn inteligentulojn en Vilnius. Pro ĉiuj ĉi malkomprenoj kaj polaj minacoj la litovaj defendaj potencoj estas devigitaj ĉiam stari kiel la gardantoj ĉe la litova sendependeco.

Lastatempe multaj poloj en Vilnius estis tre malkontentaj je la kontrolo komisiono de Ligo de Nacioj. La prezidanto de tiu ĉi kontrolo komisiono estas franco, s-ro Chardigny. Iufoje kelkaj polaj virinoj, precipe el aristokrataj familioj, ĉirkaŭis s-ron Chardigny kaj superŝutis lin per mucidaj ovoj kaj terpmoj. Farante tion la virinoj kriis: „Vivu Francio! For Ligo de Nacioj!“ Post tia okazintaĵo la kontrolo komisiono estis devigata la saman tagon transveturi en urbon Kaunas, nuntempa ĉefurbo de Litovio.

El internaj aferoj de Litovio estas nuntempe la plej grava la terposeda reformo, pri kies definitiva solvo sin okupas la Konsultacia Seimo (konsultantaro). Sed pri tiu ĉi demando mi skribos alian fojon, kiam tiu reformo estos solvata.

Komence de nuna jaro, laŭ pakontrakto kun Rusio, farita pasintan jaron la 12-an de julio, estis revenigitaj el Rusio litovaj civitanoj, kiuj dum la mondmilito estis forkuritaj aŭ ekzilitaj el Litovio. Tiu ĉi revenigado estis ĝis nun malhelpata de la rusa sovjeta registaro, kiu precipe al litovaj inteligentuloj ne volis doni elbecon reveni en la patrujon. Multajn litovajn inteligentulojn la sovjeta registaro arestis kaj tenis en malliberejoj. En moskvaj malliberejoj oni donis al ĉiu homo (malliberulo) ĉiutage po 136 gr. m. da malbona pano, 8 gramoj da sukero kaj unu-

foje dum la tuta tago tre malbonan kaj naŭzan supon, kiu nur difektas la digestajn organojn.

Revenintaj el Rusio litovaj civitanoj ĉiuj havas mizeran aspekton, ĉar ili estas malsanĝitaj kaj ĉifonvestitaj. Kvankam ili havas multe da mono, tamen la kurzo de la sovjeta rublo estas tiom malalta, ke post la interŝanĝo je litova mono restas malmulte, ĉar por unu litova marko oni donas ĉ. 150 sovjetajn rublojn.

A. Klimas,  
Kaunas (Liovio),  
Red. „Lietuvos Ŭkininkas“, Laisves Aleja 60.

## Gravaj Informoj pri Brazilio por Komercestoj, Industriistoj kaj Kolektantoj.

La brazila registaro decidis solene festi la unuan centjaran datrevenon de la nacia sendependeco, efektivegante en Rio de Janeiro, dum la monatoj septembro, oktobro kaj novembro 1922, grandegan

## Nacian Ekspozicion pri Komercio, Industrio, Transportoj, Kutimoj ktp.

La Agada Komitato de tiu ĉi Ekspozicio disdonas kaj dissendos al ĉiuj, kiuj ilin petos, fotografajojn, poŝtkartojn, prospektajn kaj statistikajn informojn, kiel propagandon de la Ekspozicio kaj de la brazilaj produktaĵoj, naturaj belajoj, ktp.

Jen estas do bonega okazo por montri la disvastigon de Esperanto tra la mondo.

Ĉiu, kiu deziras ricevi tiajn sendotaĵojn, tuj skribu en Esperanto al tiu Komitato petante ilin.

Oni preskaŭ povas garanti ke, se la Komitato ricevos grandan nombron de tiaj petoj, ĝi decidus uzi Esperanton por la reklamo de la Ekspozicio. Estas tre ĝojige, ke la Generala Sekretario de tiu Komitato estas la malnova esperantisto s-ro J. B. Mello e Souza, ankaŭ Generala Sekretario de Brazilia Ligo Esperantista.

Adresu vian peton al: Comissão Executiva do Centenario, Bibliotheca Nacional, Rio de Janeiro (Brazilio).

## Al Esperantistaj oficistoj kaj oficistinoj. Dua alvoko.

En la maja-numero 1920 de Geneva Esperanto mi presigis alvokon pri la bezono de Internacia Oficista Esperanta Asocio kunliganta ĉiufakan oficistaron komercan, industran, bankan, k. e. por komuna agado por disvastigi en la supre nomitaj rondoj nian lingvon. Nun ricevinte multajn leterojn el diversaj landoj aprobrantajn mian ideon, mi opinias, ke alvenis la tempo de la organizacio de la nomita asocio. Mi do turnas min denove al ĉiuj samideanoj, kiuj simpatias kun la ideo kaj deziras aliĝi al la ĵus fondigita asocio, ke ili bonvolu tuj sendi al mi siajn nomojn kaj adresojn, por ke mi povu starigi la liston de niaj ano.

Post kelka tempo mi penos dissendi al la aliĝontaj anoj cirkuleron pri mia plua agado, kiu estas pri la interna regularo, pri elekto de ĉef-reprezentantoj en ĉiuj landoj, pri nia komuna organizo, pri venontaj kunsidoj dum la Praha Kongreso, ktp.

Ĉiuj esp. gazetoj reprene.

ADOLFO OBERROTMAN  
str. Krak. Przedm. 10-15  
VARSOVIO.

„Very well!“ kriis lia kamarado, flanken ŝovante la ŝeĝojn kaj alproksimigante.

„All right!“ ripetis ankaŭ Dima per triumfa voĉo. „Nun eliru, Mateo, en la mezon kaj precipe gardu vian vizaĝon! Li estos celanta al via nazo kaj al viaj lipoj. Mi konas lian manieron.“

Sed Mateo, kvazaŭ nenio okazis, ree sidigis kaj malfermis sian libron.

La irlandanoj estis konsternitaj. Tamen, ĉar ili por ĉio havas siajn regulojn, baldaŭ Paddy aliris Mateon riverencante kaj svingante la pugnoj, kvazaŭ muelajn brakojn.

„Nu, nenio estas farebla,“ pensis Mateo. „Se vi mem ĝin nepre volas...“

Kaj en la sama momento la forta Loziŝcano levigis, rektigis kiel urso kontraŭ ĉasisto, levis super la kapo de Paddy ambaŭ siajn manojn, ekkaptis liajn densajn, kvankam ne longajn harojn, klinis lian korpon kaj kunpremite lian kapon inter siaj femuroj, kelkfoje frapis lin tre laŭte per manplato.

Ĉio ĉi okazis tiel rapide, ke neniu povis malhelpi ĝin. Sed kiam Paddy leviginte ĉirkaŭrigardis, kvazaŭ ĵus naskita infano ne scianta, kio okazis al ĝi antaŭ unu minuto, ĉiuj nevole eksplodis per ridego...

Dum kelke da minutoj la granda ĉambro de Mr. Bork pleniĝis je ridego diversvoĉa kaj diversa maniero. Eĉ la altkreska amerikano kun la sekta vizaĝo kaj flavruĝa ŝovelilforma barbo, viro en muellezita kvadrata kostumo, homo, sur kies malgrasa kaj sulkoplena vizaĝo neniam estis videbla eĉ saĝo de ridejo, nun faris nedireble komikajn grimacojn, kvazaŭ li okaze estus trinkinta vinagron; el lia gorĝo elŝirigis sonoj similaj je balbutado. Li senliphare junulo, kiu antaŭ nelonge luprentis la lastan liton de Mr. Bork, fesis sin sur

## Recenzojo.

LIBROJ.

INTERESA NOVELARO. Tradukis, eldonis, presis: Fratoj Feilke, Oppeln, Supra Silezio, Ring 11. 12: 17 cm, 36 p. kaj kovrilo. Prezo 3 resp. 4-pp., por Germanio kaj aliaj landoj kun malbona valuto 5 mk., por ceteraj landoj 4 mk.

La unuan pravon de sia stilo kaj spriteco la frato „Trifolio“ jam liveris antaŭ naŭ monatoj, kiam ili eldonis unu numeron de revuo „Juneco“, kiu — pro facile imag-eblaj kaŭzoj — estis mornnaskita infano. Mi esperas, ke eldono de la novelaro alportos al ili pli da ĝojo kaj sukcesoj, kiujn mi deziras al ili pro ilia fiera gaŭco, ilia sincereco kaj ilia granda fervoreco. Cetera la noveletoj estas efektive interesaj, la stilo estas bona kaj flua, preseroj ne enestas (nur la kompostmaniero ĉi tiu trovas parte iom strangan). La aludo pri „Esperanto Ĉiutaga“ en la fantazia rakonto „Sonoĝo je noktomeza horo“ elmontras, pri kio revas la trifolio Feilke; jen kie iliaj pensoj koincidas kun tiuj de la redaktoro de ET, kvankam nuntempe la „Ĉiutagulo“ estas ankoraŭ pli da ziro. — La libreto mi povas bonkonscience rekomendi, ankaŭ al komencantoj. (T. J.)

ENGLISH-ESPERANTO DICTIONARY, de Fulcher & Long. 346 kaj 32 paĝoj, 14: 20 cm. Bone kaj klare presita, bele bindita. Prezo 8 ŝil. se oni rekte mendas ĉe BEA, Hart Street 17, London W. C. 1. Eldonejo E. Marlborough & Co., London 1921. La libro enhavas pli ol 30000 anglajn vortojn kun la esp. traduko.

BOLOGNA kaj RAVENNA. Du gvidlibretoj de po 16 paĝoj, 11½: 16 cm. Verkitaĵ de Humberto Toschi. Eldonejo A. Paoli, S. Vito al Tagliamento.

Interesaj priskriboj de la historiaj norditaj urboj Bologna kaj Ravenna kun multaj ilustraĵoj.

## GAZETOJ.

ESPERANTO PRAKTIKO. Majo. Detala bonhumora raporto pri la Revelo-tago en Köln kun bildo de la partoprenintoj. Artikolo pri Essen kun vidaĵo de la kongresejo.

FRANCA ESPERANTISTO. Majo. Artikolo pri Orléans, urbo de la nunjara kongreso de francaj esperantistoj, kun du ilustraĵoj.

KATALUNA ESPERANTISTO. Majo. La dua Diskuta Kunveno de Esperantistoj de Iberaj Landoj okazos la 26—29. majo en Zaragoza.

NEDERLAND-ESPERANTO. 3., 10., 17., 24., 31. marto, 7., 14., 21., 28. aprilo.

Tiu oktavformata gazeteto aperas same regule kiel ĝia pli granda frato ET. Intencas aperi 8-paĝa, kiam ĝi havos 600—700 abonantojn.

THE BRITISH ESPERANTIST. Majo. Kun programo de la brita kaj skota kongreso.

VEGETARANO. Aprilo. Adreso: O. Bünenam, Hamburg-Fuhlsbüttel, Germ. Alsterkrug-Chaussee 586.

## Anoncetoj.

DOMETOIN (ingojn) de vivantaj surlandaj kaj endolĉakvaj MOLUSKOJ (ilmakoj kaj konĉoj) el ĉiuj landoj deziras ricevi (intersanĝe je ĵuj aĵ dezirataj objektoj aŭ esperantoj) zoologiisto d-ro R. Wohlstadt, 22, Lübecktherhof, Hamburg (Germ.). Mineralogia-Geologia Instituto.

PRAHAANOJ! Kiu el vi povus akcepti senpage nur por la kongres-samajno esp. junulon, kiu tre deziras ĉesiti la kongreson, sed pro malbona materiala situacio ne povas efektivegi sian deziron. Sin turni al J. Lejzerowicz, Lodz, Polujo, 28, Kilnŝteto.

TIROLO Esperantista familio (geozdoj kun dekdu-jara filo), kiu volas pasigi la lernejan libertempon, depost komenco ĝis fino de aŭgusto, en Tirolo, tre volonte restadas inter gesamideanoj. Gesinjoroj, kiuj havas la saman deziron, bonvolu turni sin al la subskribinto. Gesamideanoj, kiuj povas rekomendi tian pensiojeon aŭ hotelon je moderaĵ prezoj, estas petataj pro tio. — Max Rother, del. UEA, Krefeld (Germ.), Königstr. 129.

F. Curra Basté, 36 Calle Xifré, Barcelona, deziras korespondadon per ilustr. poŝtkartoj kaj leteroj kun ĉiuj landoj. S-ro Stefano Bakonj, Budapest IV, Szep u. 3, Hungario, deziras korespondadon per poŝtkartoj ilustritaj kun ĉiuj landoj.

Herbert Haetzl, Breslau XII, Hermannstr. 27, Germ., deziras intersanĝon de ilustr. poŝtkartoj kaj poŝtmarkoj el ĉiuj landoj.

Fritz Spaucke, Breslau II, Brunnenstr. 50, Germ., deziras intersanĝi poŝtkartojn kun ĉiuj landoj; ĉiuj kartoj estos respondataj.

Willy Thielking, Breslau VIII, Vorwerkstr. 62, Germ., deziras opini-intersanĝon pri ĉiuj kampoj de la botaniko; ankaŭ kolektas kaj intersanĝas poŝtmarkojn.

sian liton kaj ridegis laŭte, nereteneble, svingante la piedojn en la aero, kvazaŭ timante, ke alie la ridegado lin mortusufokos. Pro la bruo alkuris el aliaj ĉambroj unue Rozka, poste Anna. Rozka vidis nur Paddy-on ĉirkaŭrigardanta en la ĉambro, tamen ŝi ridegante falis sur seĝon apud la pordo, mallevinte la brakojn kaj la kapon. Anna jam nenion ekvidis sed, infektiita de generala ridado, ŝi ankaŭ ridis, rigardante la malgrasan amerikanon, kiu ĉiam ankoraŭ singulladis kaj preskaŭ sifokigis pro ridego.

Dima ankaŭ ridis kaj komence tre fleiĝis pri sia amiko.

„Ha, ha! Jen estas nia modo! Mi la diris a vi“, li kriis al la amerikanoj, eĉ forgesante traduki angle s-ajn vortojn. „Jes! Jen kiel oni batas ĉe ni, en Loziŝĉi!“

Sed momenton poste, kiam la ridado iom post iom ĉesis, kaj ĉiuj komencis varmege pridiskuti la okazintaĵon, la vizaĝo de Dima malsereniĝis kaj post iom da tempo li diris tiel laŭte, ke Mateo ne povis ne aŭdi ĝin:

„Bone efektive! Tiamaniere urso batas ĉe sia nesto! Hontinde estas antaŭ kleraj homoj...“

„Negrave“, trankvile respondis Mateo, reprenante la biblion, kvazaŭ nenio okazis: „kiel urso, tamen bone! Alian fojon via Paddy scias...“

La irlandanoj bruidis ankoraŭ dum kelke da tempo, poste ili disigis de antaŭ Paddy, kiu elpaŝis antaŭen kaj sin direktis al Mateo, kunlirinte la ŝultrojn kaj fleksigante kiel serpeno. Mateo staris, mire observante lian strangan movadon, kaj jam estis ripetonta sian ĵusan procedon, kiam subite la irlandano iom kliniĝis antaŭen, la brakoj de Mateo senhelpe ekglitis en la aero, la piedoj levigis kvazaŭ programove, kaj li falegis surdorsen trans la liton... (Daŭrigota)

## La Senlingvulo.

Rakonto de Vladimir Korolenko.

Rekomendita de Esperantista Literatura Asocio (22-a daŭrigo.)

„He!“ diris Dima malkontente. „Pro kio nun malfrankviligi mian mortintan patronon? Oni min petis: diru! Kaj mi diris. Agu, kiel vi volas!“

„Nu, kaj mi respondas ienon: ili ne petu sian Dion, ke mi interbatiĝu kun ili...“

„Jen, jen!“ ĝojis Dima. „Mi ĵus diris al ili, ke vi estas nia plej forta viro; ne nur en Loziŝĉi, sed eĉ en la tuta distrikto. Sed ili diras, ke vi ne konas regulojn de batalado.“

Dima foriris, kaj Mateo denove enprofundiĝis en sian malnovan biblion.

Li legis, movetante la lipojn, pri tio, kiel du junuloj venis Sodomon en la domon de Lot, kaj kiel la urbanoj postulis de li, ke li elirigu al ili siajn gastejojn. Li levis la kapon kaj ekmeditis. Li meditis, ke li kaj Dima ĝuste estas tiaj samaj junuloj en ĉi tiu urbejo. Sed la karaktero de Dima malboniĝis, kaj li mem ekiris al la urbanoj...

Dum li tiel meditis, tiu subite estingis la gason, apud kiu li sidis. Mateo rigardis posten. Malantaŭ li, tute proksime, sidis Mr. Paddy, la irlandano, kaj rideis kun senkulpa mieno.

Mateo prenis almeton, ekbruligis la gason kaj legis plue. Tamen diveninte, ke ĝi ankoraŭ ne estas la fino, li jeis rigardon malantane. Paddy staris kaj jam pretiĝis ekblovi al la fajro el post la ŝultro de Mateo.

Mateo puŝetis lin per kubuto, kaj Paddy falis sur la liton.

„All right“, ekkriis Paddy levigante kaj demetante sian fakon.

## Anoncetoj.

(Familiaj anoncetoj senpage. Aliaj kostas por dufoja enpresado la samon kiel kvin numeroj de ET. La monon ni deprenas de la konto de la abonantoj. Kvinfoja enpresado kostas la duoblon.)

**AVIZO:** Korespondado farigotoj tro kara! Al miaj multegaj gekorespondantoj en la diversaj landoj mi devas sciigi, ke pro la grandega plialtigo de la internaciaj poŝtaj tarifoj mi estas devigata ĉesigi mian interkorespondadon je mia tre profunda bedaŭro. — Ankaŭ mi sciigas al la esperantistaj filietistoj kaj aliaj, ke mi lute ne interŝanĝas poŝtmarkojn kaj neniam respondos al ĉiujlandaj proponoj. — Migrantajn kartojn mi ricevis po centoj, kaj estas tute neeble por mi pluisendi ilin. — Se oni sendos al mi respond-kupononj sufiĉajn por la respondo, mi tuj kaj akurate respondos. — Björn P. Blöndal, del. de UEA, Hvammstanga, Islando.

**AVIZO:** PEI (Petrograda Esperanta Informejo) scigas al ĉiuj samideanoj, ke ĝi senpage komunikadas diversajn informojn pri esp. movado en Rusio, Siberio kaj Ukrainio, adresojn de ĉiuj esp. organizaĵoj en nomitaj landoj ktp. PEI interŝanĝas per esp. eldonaĵoj kaj deziras korespondi kun eksterlandaj esp. organizaĵoj per poŝtkartoj. Leterojn oni sendu laŭ jena adreso: Aleksandro Pilev, Petrogrado, Fontanka 17 (administranto de PEI).

**„LA FERVOJO“**, Rotterdam. Pro ŝanĝo de la estraro la sekretariejo de la Rotterdam'a Esp. Klubo „La Fervojo“ depost 15. aprilo troviĝas ĉe Zwaanshals 212 b, Rotterdam, Nederlando. Oni estas petata, direkti ĉiujn korespondantojn koncerne suprenomitan klubon al la nova adreso. La parolad-kunveno restas: Botersloot 90, ĉiun laŭdon vespere de la 9-a ĝis la 10-a, samtempe kun la Rotterdam'a Lab. Esp. Grupo. La estraro nun estas: s-ro Woorntman, stadidomo D. P., prezidanto (provizore), s-ro J. W. F. Poolen, ŝarĝestro, stadidomo F. O., sekretario, s-ro Kok, ĉefkonduktoro st. D. P., kasisto, s-ro Klaasen, ĉefkonduktoro st. D. P., bibliotekisto.

**ESPERANTAĴ GAZETOJ.** Moacyr Cominha, Boulevard Nogueira Acioly, Ceara, Fortaleza, Brazilo, deziras aĉeti la unuan numeron de ĉiuj esperantaj gazetoj. Oni sendu ĝin al li kune kun ĝia prezo. Li pagos per resp.-kup.

**PETO,** precipe al francoj. — 18-jara ĉeĥo, abituro de reala lernejo, parolanta ĉeĥe, esperante, france kaj germane, deziras labori mane aŭ spirite ĉe elektroteknika entrepreno en Svisio, Francio, Svedio aŭ alie dum unu jaro antaŭ la studado ĉe alta lernejo. Afable skribu al Jan Jelinek, Husovo nam. 511, Hradec Kralovĉ, Ĉeĥoslovakio.

**PETO,** Esp. Societo „Laboro“ petas ĉiujn esp. redakciojn, eldonejojn, firmajn ktp. alsendi al ĝi siajn prezarojn, katalogojn ktp. por vendo organizata ĉe ĝi. Adr.: Warszawa (Pol.), Wipolna 47 A, m. 19.

### Korespondado kaj Interŝanĝo.

(Dufoja enpresado kostas la samon kiel tri numeroj de ET. La monon ni deprenas de la konto de la abonantoj. Kvinfoja enpresado kostas la duoblon.)

**D-ro L. Kaspar,** juĝisto en Eibiswald, Stirio, Aŭstrio, deziras korespondi precipe pri juristaj temoj; li ankaŭ respondos volonte aliajn demandojn ĉiuspacajn; liaj filinoj ankaŭ interŝanĝas poŝtmarkojn ordinarijn.

**S-ro Mikko Laulaja,** adr. Lohiluoma, Finnlando, deziras korespondi kun la tuta mondo per il. poŝtkartoj kaj leteroj.

**S-ro Veikko Lohikoski,** adr. Mieto, Finnlando, deziras korespondi kun la tuta mondo per il. poŝtkartoj kaj leteroj.

**S-ro Väinö Kyttä,** adr. Mieto, Finnlando, deziras korespondi kun ĉiuj landoj per ilustr. poŝtkartoj kaj leteroj.

**S-ro Matti Avinen,** adr. Kurikka, Finnlando, deziras korespondi kun la tuta mondo per il. poŝtkartoj kaj leteroj.

**S-ro Elias Syvaaja,** adr. Mieto, Finnlando, deziras korespondi kun samideanoj en la tuta mondo per il. poŝtkartoj kaj leteroj.

**S-ro S. E. Risku,** adr. Mieto, Finnlando, deziras korespondi kun fraŭlinoj el ĉiuj landoj per ilustritaj kartoj aŭ leteroj.

**S-ro d-ro August Sochacki,** del. UEA, Denblin (Polio), deziras korespondi per poŝtkartoj ilustritaj pri kuracistaj kaj humanaj temoj; nepre akurate respondos.

**S-ro J. Szpinak,** Warszawa (Polio), Miła str. 20/22, deziras interŝanĝi kartojn ilustr., poŝtmarkojn ktp. kun tujmondaj esperantistoj; ĉiam respondos.

**S-ro Izaak Aler,** Bialystok (Polio) skrzyńca poczt. 55, deziras korespondi kun samideanoj, sendas latviale belajn polajn poŝtmarkojn kontraŭ papermono; nepre kaj tuj respondos.

**Izaak Spiro,** Bialystok, Pol., Poŝtkesto 61, deziras korespondi kun gelnantoj, ankaŭ vendi kaj interŝanĝi poŝtmarkojn, papermonojn kaj monbiletojn.

Kiu bezonas bonejn polajn poŝtmarkojn kaj papermonojn kolekti, tiu povas interŝanĝi poŝtmarkojn kaj papermonon kun mi. Mi korespondas ankaŭ pri matematiko kaj naturscienco. — Lazaro Grosberg, Bialystok (Pol.), ul. Jurowiecka 5.

**M. Goldberg,** Bialystok, Polujo, Sienkiewicza 88, deziras korespondi kun gelnantoj en ĉiuj landoj, ankaŭ interŝanĝi poŝtmarkojn kaj papermonon, kun kiu ajn. Tuj respondos.

**A. Hiller,** Warszawa, Polujo, Ogródowa 26/51, deziras korespondi pri laborista movado, komunismo, ankaŭ interŝanĝi poŝtmarkojn kaj papermonon. Tuj respondos.

**Aleksandro Pilev,** Rusio, Petrogrado, Fontanka 17, deziras korespondi kun esperantistinoj de Finnlando, Francio kaj Anglio, per poŝtkartoj ilustritaj (bll.); tuj respondos.

**Anna Pileva,** Rusio, Ukrainio, Zmiev (= urbo), Ljpodok, deziras korespondi kun samideanoj el ĉiuj landoj.

**Omsk,** Siberio, strato Novaja 18, Klubo Esperantista, s-ro Anufrii Gordejev, deziras korespondi kun samideanoj el ĉiuj landoj, precipe kun fraŭlinoj, pri diversaj temoj.

**V. Dobrovolskij,** Scheljabinsk (Rusl.), Privokzalnaja poŝto, deziras interŝanĝi esp. ĵurnalojn, ilustr. poŝtkartojn ktp. kun germanaj kamaradoj.

**Otto Czech,** fervoj-officio, Brunnersdorf apud Kaaden, Bohemio, Ĉeĥoslovakio, deziras korespondi kun samideanoj en la tuta mondo per poŝtkartoj ilustritaj; interŝanĝas poŝtmarkojn kaj esp. gazetojn.

**S-ro Julio Dicker,** Miskolcz, Hung., Tetemvar 12, deziras korespondi per poŝtkartoj ilustritaj kun ĉiuj landoj kaj per leteroj, precipe kun librovidantoj.

**S-ro Julio Krimer,** Miskolcz, Hungario, Szechenyi utca 87, sz., deziras korespondi per ilustr. poŝtkartoj, poŝtmarkoj kaj leteroj kun ĉiuj landoj.

**S-ro Aleksandra Weisz,** Miskolcz, Hungario, Zsolcai-kapu 5, sz., deziras korespondi per poŝtkartoj ilustritaj, poŝtmarkoj, gazetoj kaj leteroj kun ĉiuj landoj.

Mi vendas hungarajn poŝtmarkojn, multe pli malkare ol katalog-prezoj. — Kolomano Wiesinger, Budapest VII, Wesseliényi str. 80.

**H. Haenen,** administristo de l' minlernejo, Heerlen (Hol.), deziras interŝanĝi poŝtmarkojn kun supersilezianoj, rusoj, polojn, ĉeĥoslovakianoj, finnoj kaj ekster-eŭropanoj.

Kelkaj membroj de la Esp. Grupo Horrem, Bez. Köln, Germ., deziras korespondadon kun samideanoj el ĉiuj landoj. Oni skribu al Esperanto Grupo, Horrem, Bez. Köln, rest. Jungbluth.

Kiu sendos al mi 50 malsamajn, nedifektajn, stampitajn poŝtmarkojn el sia lando (ne germ., aŭstr. aŭ ĉeĥoslov.), ricevos mult-ilustritan 8- aŭ 10-paĝan esp. gvidolovon.

**P. Tarnow,** Kiel (Germ.), Olshausenstr. 18.

# Internacia Foiro de Breslau

## Dua Printempa Foiro samtempe 52. Poragrikultura Maŝinfoiro

2.—5. Junio 1921.

Agrikulturaj maŝinoj kaj iloj; maŝinoj kaj iloj por fiŝkaptado, arbara ekspluato, ĝardenkulturo, birdar- kaj abel-bredado, ĉasadado, artefaritaj sterkajoj, semajoj; agrikultur-industriaj instalaĵoj; maŝinkonstruado kaj tekniko; konstrumetio kaj konstrumaterialo; \* \* \* \* \* arto kaj armetio, internaj dekoraciaĵoj; buroajoj; sporto. \* \* \* \* \*

Informojn donas

## Breslauer Messe-Gesellschaft m. b. H.

ESPERANTO-FAKO

Breslau I, Ohlauerstr. 87.

### Varsovia Esperantista Societo „Laboro“

suksesis ricevi novan loĝejon en urba lernejo, Wspolna 47-A, organizis tie konstantajn kursojn marde kaj sabate de 7 h. vespere kaj arangas pure esperantajn kunvenojn ĉiudimanche je 11 h. matene.

En butiko de S-to oni vendas ĉiujn esperantajn aĉetatajn per mono ricevata de kursoj, kotizajoj, profitoj de butiko, kaj ŝparmono lokata per anoj ĉe S-to.

ET estas vendata per gazetisto apud centra stadidomo (Marszalkowska 101).

Oni petas posedantojn de esperantajj turni sin al S-to kun ofertoj.

### Angla kaj Esperanta Etimologio

(Angle kaj Esperante.)

Verkita de Charles G. Stuart-Menteth.

(Oksforda diplomo kun distingo.)

„Utila lernilo por atentigi la anglan publikon pri multaj Esp. radikoj en ilia lingvo.“

Holanda Pioniro.

„Interesege tabeloj.“ Kristana Espero.

Vidu citojn p. 57 de nova Jar-libro B. E. A.

Prezo 10 pencoj (= 4 respond-kuponoj) afrankite.

B. E. A., 17, Hart Street, London WC 1.

## Stampilojn



ilveras

Rob. Pfennigwerth, Hirschfelde, Saks., Germanio.

## Kataluna Esperantisto

Oficiala Organo de Kataluna Esperantista Federacio.

Ĉiunonata gazeto, nur esperante redaktata, sur kiu regule aperas bonegaj tradukoj de valoraj verkoj el la kataluna literaturo.

Jarabono: 5' pesetoj.

Redakcio kaj Administracio: Carme, 30, Barcelono.

S-ano Willy Kupper, Düsseldorf 115, Germ., Ĕrkratherstr. 94, deziras interŝanĝi poŝtmarkojn. Kiu sendas al mi poŝtmarkojn de sia lando, ricevas la saman kvanton da germanaj.

S-ro Herber Miksch, Düsseldorf, Germ., Ackersstr. 79, 17-jara lernanto, deziras korespondi per ilustr. poŝtkartoj kun ĉiuj landoj.

S-ro Willy Hirschbach, Düsseldorf, Germ., Martinstr. 22, deziras korespondi kun samideanoj en la tuta mondo.

S-ano Willy Hilgers, Düsseldorf-Eller, Germ., Gertrudisplatz 21, interŝanĝas poŝtkartojn ilustr. kun samideanoj el ĉiuj landoj.

S-ro Eduard Volkmann, Düsseldorf, Germ., Uerdingerstr. 77, deziras interŝanĝi ilustr. poŝtkartojn kaj poŝtmarkojn; tuj respondos.

S-ro Theodor Meisen, Düsseldorf, Germ., Ellerstr. 155, deziras korespondi kun ĉiulandaj samideanoj.

S-ro Wilhelm Preiss, Düsseldorf, Germ., Friedenstr. 79, deziras korespondi per ilustr. poŝtkartoj; ĉiam respondos.

S-ano Paul Münten, Düsseldorf, Germ., Fürstenwall 119, kiu sendas al mi 40-50 poŝtmarkojn de sia lando, ricevos 50 poŝtmarkojn de mia lando.

S-ro Mathias Mattheisen, Düsseldorf, Germ., Elisabethstr. 79, deziras korespondi kun samideanoj ĉiulandaj; ĉiam respondos.

S-ano Josef Jungesblut, Düsseldorf (Germ.), Hoffeldstr. 18-11, deziras korespondi per il. poŝtkartoj kun ĉiuj landoj.

Kiu sendas al mi poŝtmarkojn de sia lando, ricevos markojn de mia lando. Ankaŭ mi korespondas per ilustr. poŝtkartoj. — Helmut Janda, Breslau, Germ., Gabitzstr. 125, bei Dalowski.

Erich Haschke, 12-jara, Kronprinzenstr. 11 en Breslau, Germanio, deziras korespondi per ilustr. poŝtkartoj, interŝanĝas poŝtmarkojn kun la tuta mondo; ĉiam respondos tuj.

S-ro Theodor Oster en Godesberg a. Rh. (Germ.), Burgstr. 46, deziras interŝanĝi poŝtmarkojn kun ĉiuj landoj.

## Centrifugaj Pumpiloj

Vapor-Turbinoj, Vapor-Kaldronoj, Vapor-Maŝinoj, Tubo-Kondukilaroj, Leviloj, Transportiloj, Maŝinoj por Sukerfabrikejoj, Reservejoj, Movigilaro, Fandajoj, Kradostangoj

estas fabrikataj de

## Fratoj Stork & K-io

Hengelo (O), Nederlando.

Fabriko kun pli ol 2000 laboristoj.

Esperanto korespondata.

Nur petoj de seriozaj firmoj estas konsiderataj.

## KOMERCISTA ESPERANTO-GRUPO

Freiburg i. Br., Katharinenstr. 14

peras ĉiuspacajn negocojn. — Rilatoj al gravaj germanaj firmoj. Perado senkoste.

Uzu niajn servojn!

## Rozoleo bulgara

unuakvalla

boteleto da 5 gramoj por 100 mk.

„ „ 10 „ „ 190 „

Seriozaj aĉetontoj sin turnu al

Iv. Krestanoff,

Karlovo (Roza Valo), Bulgario.

## Samideanoj!

Ĉu vi vidis jam urbegon kun grandaj palacoj kaj vilaĝaj stratoj unu apud la alia sur la bordo de granda rivero inter ĉarnaj montoj?

Ĉu vi vidis jam urbegon, kie kunigas la moviĝemo kaj sensaciemo de l' okcidento kun la frankvileco kaj konservatveco de l' oriento?

Ĉu vi vidis jam urbegon, kie kunigas la plej belaj virinoj kaj knabinoj de la mondo el la rasoj kunmiksitaj de hungaroj, germanoj, slavoj kaj judoj?

## Budapest

estas laŭ diro de la vojaĝantoj urbejo belega kiel Napoli, Konstantinopolo kaj aliaj famaj urboj.

Budapest estas la pordego inter oriento kaj okcidento.

Budapest gastigos la esperantistojn dum aŭgusto 1921 per poŝtkongresaj festoj.

## Venu el Praha al Budapest!

Anoncu vin al s-ano A. Laquer, Budapest VII, Kiraly u. 57.

Provizora kotizajo: el okcidentaj landoj tri mon-unuoj (10 mk. por germanoj).